

**Kvin rakontoj de  
Attila SALGA**

<b>La almozulo (2018) .....</b>	<b>3</b>
<b>Ho, se mi estus ĝin vidinta! (2018) .....</b>	<b>9</b>
<b>Rilaksado fariĝis por mi osto en la gorgo (2017) ....</b>	<b>13</b>
<b>Ĉe Danubo (2002) .....</b>	<b>16</b>
<b>Abolo de malsanoj (2019) .....</b>	<b>19</b>

Hungaria Esperanto-Asocio, 2023





## La almozulo

Jam de horo mi staras, apogante min al la muro. Almenaŭ cento da homoj preteriris antaŭ mi. Kelkaj kun aĉetsaketo, kelkaj kun aktujo, aranĝante siajn aferojn, aliaj nur promenis, havate abundan tempon.

En la dekstra mano mi tenas du plenigitajn receptojn, en la maldekstra grandan konservujon (kompreneble, bele purlavitan), en ĝin oni povas faligi la kontribuon, kiujn la pasantoj donas helpe por la elaĉeto de mia medikamento. Ĝis nun kolektiĝis nur kelkaj dudek-forintoj kaj du cent-forintoj.

Mi havas altan tension, plurfoje trafis min rena koliko kaj havas kanceron. Pri tio mi havas paperon, kiun mi tenas en la mano; prave, neniu scivolas pri miaj pruvoj. Laŭ mi kelkajn semajnojn mi certe havas antaŭ mi, se daŭre mi prenados la medikamenton, se mi trovos komfortan benkon en la parko kaj povos kovri min per granda mantelo. La noktoj estas jam malvarmaj. Hieraŭ nokte mi turniĝadis tra pluraj horoj, ĉar malvarmis mia dorso, vane mi koncentris miajn pensojn al someraj noktoj de dudek kvin gradoj, kiam eĉ la ĉemizon mi malbutonis sur la brusto.

Al mi ŝajnas, kvazaŭ okazis pasintjare, kiam mi devis retiri min en ombron pro la sunardo kaj priŝprucigi min per malvarma akvo, por elteni ĝis vespero.

Nun mi staras ĉi tie, ĉe la angulo, apud la apoteko, preĝpetante la Eternulon helpi min: venu al mi donacemaj homoj, kiuj donas almenaŭ po ducent fortintojn, por ke la mono laŭeble plej rapide kolektiĝu. Mi apogas la dorson al la muro, kaj eĉ tra la mantelo mi sentas la malvarmon, kiun ĝi elradias en mian spinon. Ĝi estas radianta muro. Feliĉe, ne ĉernobila. Tie la dozo estis mortiga. Mia stomakkancero disradias doloron tra mia tuta korpo. Matene mi povis nur trudgluti du parojn da kolbasetoj kaj tri bulkojn. Mi

sciis, ke mi nepre bezonas energion. Preskaŭ mi vidas antaŭ mi mian vizaĝon, kiu estas faltoriĉa, griza, malĝoja, kaj en miaj okuloj flagradas malespero.

Nun mi ne ne plu rigardas la teron, ĉar mi volas, ke ankaŭ aliaj rimarku mian marprofundan malĝojon.

– Kial tenas la onklo tiun rustan konservujon? Ĉu li eble soifas? – demandas ruĝvesta knabineto sian patrinon, kiu haste prenas ŝian brakon kaj plutiras ŝin. Dume de maldekstre proksimiĝas sinjoro, kiu faligas ducent forintojn en mian skatolon. La monero postulas al si spacon: ĝi fojfoje ekklakas, aparte kiam mi skuetas la ujon. “Ĉiuj parencoj venu al vi, por revidi vin!”

– Mi tre dankas, Dio benu vin!

\* \* \*

Dum la tuta tago mi sidas ĉe la skribotablo, kelkfoje ŝajnas al mi, ke mi ne plu povas stariĝi. Estus bone sportumi. Zolĉjo kaj la amikoj jam plurfoje vokis min, sed kurado estas elpensita ne por mi, kaj naĝi mi ne scipovas. Mi elvenis en la parkon, por spiri freŝan aeron, sidiĝis sur ĉi tiu benko kaj okulsekvas, kiuj kien iras. Mi klopodas diveni, kie la pasantoj laboras, pri kio ili okupiĝas, kiuj atendas ilin hejme. Poste mi fermas la okulojn kaj transdonas min al la verŝajne lasta luminundo de la postsomero. kiu jam ne bruligas, sed varmigas al mi la vizaĝon. Mi ne forgesu aĉeti analgezikon por mia bopatro. Mi ankoraŭ havas tempon, sed plie pasintan, tiun de la foririnta somero...

Mi trinkas gluton da akvo kaj levas la rigardon. Rande de la parko, apud la apoteko staradas viro, tenante ion en la mano. Tre malofte iu haltas apud li por tempeto, poste iras plu. Per la alia mano li altenas ian paperon.

Mi ekiras. Restas kvardek ĝis kvindek metroj, kaj mi ne povos eviti lin.

– Pardonu, sinjoro! Mi ne volas ĝeni vin, sed mi petas vin, bonvolu helpi. Mi estas malsana, senlabora, mia familio forlasis min, mi ne havas monon por medikamento. Kompatu min per kelkaj forintoj, Dio benos vin.

– Ĉu delonge vi staras ĉi tie?

– Ho, de tre longe, kaj la mono malfruas kolektiĝi. Mia kapo preskaŭ krevas, mi havas stomakan kanceron, sed eĉ por analgeziko mi ne havas monon. Mi ne povas elaĉeti ĝin per ĉi du receptoj.

– Mi komprenas vian situacion. Mi tre volonte donus al vi eĉ ducent forintojn, sed neniom mi kunhavas; mi kutimas pagi per karto.

– Dio helpu vin! Se vi ne prenos por ĝeno: du paŝojn for estas banko, volonte mi akompanos vin ĝis la monaŭtomato.

Li malbone aspektas, liaj okuloj estas enprofundiĝintaj, sube kun grizaj makuloj (tumoroj!), la kompatindulo devas esti tre malsana. Li turnis sin al mi, mi ankoraŭ povos doni al li palan esperon por la vivo, ĉar li pli longe vivos, se li ricevos siajn medikamentojn. Liaj sportoŝuoj estas preskaŭ novaj, la vesto akceptebla, kaj tio pruvas, ke ankaŭ aliaj bonemuloj havas kompaton al li. Eĉ imagi mi ne povas, kiel mi detruigus en tia situacio dum du tagoj; mi, al kiu komforto kaj kvieto apartenas kiel aperitivo al tagmanĝo.

\* \* \*

Mi ne lasos foriri ĉi tiun bonvolan homon, je kiu videblas, ke li emas helpi. Jam almenaŭ de horo kaj duono mi apogas la malvarman muron, sed pli ol kelkcent forintoj ne kolektiĝis. Videblas je li, ke li pretas doni eĉ ducent forintojn. Pri bankkarto mi ne havas klaran koncepton, sed mi konsideras ĝin superflua, ĉar ĝi malfaciligas la vivon. Oni devas ĉiufoje aliri aŭtomaton kaj elalmozi de ĝi la monon. Nenio povas esti pli oportuna, ol se la

aĉetilo kuŝas en la propra poŝo aŭ en ĉi tiu konservujo. Mi klakigas ĝin... Li nur gapas al mi.

– Bedaŭrinde, eble neniam la mono kolektiĝos.

– Mi tre kunsentas. En simila situacio mi ne sciis, kion fari. Ĉu vi havas familion? Edzinon? Infanojn?

– Ĉio estas tempo pasinta. Ni divorcis, mi estas forlasita, sola kiel vento en dezerto, eĉ la kompanoj ne revidadas min, ĉar mi pretas labori, se io doniĝas, ili, male, preferas diboĉi. Mi estas honesta homo, nur la cirkonstancoj parolas kontraŭ mi. Mi tre hontas, ke mi deviĝas stari stratangule por almozpeti iom da mono, por vivi plu kelkajn tagojn. Sed ankaŭ mi havas rajton vivi, eĉ se ofte terure doloras min la stomako, kancero ja ne estas kareso. Mi ankoraŭ ŝatus ĝojigi aliulojn, eĉ se ĉiu mia tago estas tiel senkonsola, aŭ ĝuste pro tio. Hieraŭ sur la ludoplaco falis knabeto, mi alpaŝis, levis lin. Li estis feliĉa, alridetis min. Tamen tuj aperis la patrino kaj forsendis min al pli varma loko, vi scias, en la inferon. Mia haŭto estas bruneca, li kredis, ke mi estas enmigrinto kaj volas forlogi ŝian infanon. Ne ĉiu homo amas la alian: oni malamas, interbatiĝas, sputas galon unu kontraŭ aliaj, kvankam ja ĉiuj devenas de Adamo kaj Eva, do ni estas iele-tiele parencoj. Tamen veras ja, ke unu estas pli mizera ol la alia.

Mia rakonto tre bone efikis. Mi preskaŭ sentas sur la haŭto la kunsenton, kompaton, kiun li radias al mi. Tamen mi bezonas daŭrigi:

– Neniun mi havas en ĉi tiu mondo, ja mi estas nula neniun. Mi eĉ ne memoras, kiel sentiĝas, se oni brakumas min. Almenaŭ amiko...

\* \* \*

Kvankam mi ne estas, ja ankaŭ ne estos amiko de ĉi tiu almozulo, sed tiel kompatinda estas la mizerulo. Mi brakumas lin. Niaj vestoj intertuŝiĝas. Per la manoplatoj li frapetas al mi la skapolojn, tiras min al si, poste delasas. Nu, tiom sufiĉas.

Ni ne iros al la monaŭtomato. Mi ne scias, kiom kostas liaj medikamentoj, sed almenaŭ unu el la preskribitaj mi aĉetos.

– Vidu, amiko! Tiel mi ne povas vin helpi. Venu kun mi en la apotekon, tie ni vidos, kiom la medikamento kostas, mi aĉetos ĝin al vi. Ne miru, mi scias, ke tio trafas vin neatendite, sed ŝajnas al mi, ke hodiaŭ mi pretas bonfari al vi. Nu, ni ekiru!

Li ne moviĝas, staras kvazaŭ alnajlita. Lia vizaĝo ruĝiĝas.

– Ne estos bone tiel, sinjoro..., ĉar mi jam ne valoras eĉ nur unu-du mil forintojn, ajnamomente mi povus morti, nenia pilolo jam utilas al mi.

Tenere mi prenas lian kubuton, por afable instigi lin al ekiro.

– Ho, tiel boneman kaj afablan homon, kiel vi estas, neniam mi renkontis! Dio benu vin, iru trankvile for, mi ne plu ĝenos vin.

– Vi ne ĝenas, ĝuste por vi mi klopodas. Ne rezignu la esperon kaj ĝoju, ke mi helpas!

Nun li ŝanĝas stilon. Prenas mian kubuton.

– Efektive vi estas granda bonulo. Tial lasu min malkovri sincere, ke ĉi tiuj ĉe mi estas neveraj receptoj. Feliĉe, mi estas sana kaj vigla kiel fiŝo en akvo, sed mi soifiĝis je iom da prunbrando. Vi komprenas min, ĉu? Mi vidas, ke vi tre miras pri ĉi tiu bona novaĵo. Mi ne mortos postmorgaŭ. Sed sendepende de tio vi estas fakte tre bona homo. Lasu min, pridonaci vin, mi ne estu la plej fia de la friponoj, ŝtelistoj kaj banditoj!

Li elprenas poŝtelefonon.

– Ĝin mi redonos al vi. Mi forprenis ĝin, kiam ni interbrakumis.  
Ankoraŭfoje mi dankas vin pro via bonemo. Dio benu vin!

(2018)



## Ho, se mi estus ĝin vidinta!

Mi sidas en komforta fotelo. Enorma spaco min ĉirkaŭas, kaj mi vidas vitromuron antaŭ mi. En la griza krepusko verdnuancaj figuroj klopode iras-venas, interkrucas siajn vojojn, interflue malaperas, poste aliaj venas. Mi sentas odorojn: pipromenta, zingibra, citrona intermitas. Devas esti trabloveto, la aero miksiĝas. Plafono ne estas super mi; lumoj de foraj astroj blinkas. Antaŭ mi staras vera muro, kiun mi ne travidas, sed voĉoj filtriĝas tra ĝi.

– Ankaŭ mian nomon mi devas ŝanĝi, por ke oni ne konfuzu min kun aliaj. Nun mi estas Elinjo – diras la unua voĉo.

– Mi povis reteni mian malnovan nomon, mi plu nomiĝas Ella – prezentas sin la alia. – Cetere mi tre ĝojas, ke nun ni ĉi tie trafis nin; ja estis vere antaŭlonge, kiam ni kune vizitis la lernejon kaj pene solvadis la taskojn de matematiko. Ĉu vi ankoraŭ memoras, ke s-ro instruisto Bódi kurigis nin sur la korto, ĉar ni ne volis danci en la popoldanca fakrondo. Ni estis hontemaj.

– Ho jes, mi bone memoras! – diras Elinjo. – Poste mi havis akran muskolfebron, kaj miaj gepatroj ankaŭ plendis pro tio. Sed certe ne pri tio vi volas paroli.

– Efektive ne. Min interesas, kio okazis en la lasta tempo. Kio nova? – demandas Ella.

– Nu jes! Vi restis ekster multo. Ekzemple, vi ne povis partopreni la bankedon de Aleksandro. Mi rakontas ĝin, ĉar pro pluraj kialoj ĝi estis memorinda. Amerika ĝardenfesto... Eble el Holivudo oni kopiis ĝin, sed nur etdimensie ili povis fari ĝin. Estis invitita eĉ furora bando; ili muzikis tiel laŭte, ke la folioj de la floroj tremis pro la basaj sonoj. Vi povas imagi, kiel niaj timpanoj batis la tamtamon. Banjo invitis la honorindan kompanion, ĉar lia sinjor'

edzo festis sian kvardekan naskiĝtagon. Ĝi estis surprizamuzo, ĉiuj gastoj sciis, ke ili devas gardi la sekreton, kaj Luĉjo, kompreneble, konjektis nenion. Da manĝo kaj trinko estis abunde, eĉ la invititaj hundoj povis plenŝtopi la ventron.

– Mi povas imagi! – entuziasmis Ella, post kiam ŝi verŝajne sorbis buŝplenon el sia glacimalvarma limonado. Ĉar mi ne travidas la muron, nur mia fantazio povas limigi mian imagon.

Elinjo entuziasme daŭrigas.

– La katetoj estis alveturigitaj en katokaĝoj, sed oni ne kuraĝis ellasi ilin, ĉar tiuj eĉ kun la bonedukitaj hundetoj ne povis amikiĝi: ili kraĉblovis, siblis, miaŭis. Imagu! La gastoj surhavis bankostumojn. Somere, en ĝardeno kun naĝbasenoj estus ja sencece porti festan kostumon aŭ balrobon. Tiel do ĉe ĉiuj videblis la akumulita „respekto”, do pufventro, naĝringo, graskuseno kaj ĉiuj faltoj. Nu, ankaŭ pro tio ĝi ne estis vera Holivudo, malkiel ĉe la filmsteloj, kiuj akiras respekton per siaj dietmetodoj. Sed tio ja tute ne gravis! Se nome ĉiuj estas dikiĝintaj kaj surhavas graso- kaj karnokusenojn, tio ne estas okulfrapa, ĉar ĉiuj aspektas kiel la averaĝo. Sed la ĝardenamuzo ne estis ĉiutaga. Estis artfajrado, societaj ludoj, kuna baniĝo, desegnokonkurso, eĉ akrobatoj, iluziistoj prezentis sin. Ekzemple iluziisto malaperigis la saĝhorloĝon de Emeriko Kriston. Oni kredis, ke iu ŝtelis ĝin, ĉar ĝi malaperis ne dum la prezentado, publike, sed almenaŭ kvaronhoron pli frue. Ĉar la saĝhorloĝo kostis plurajn milionojn, oni jam preskaŭ alvokis la policon. Kaj tiam la iluziisto elprenis dum la unua programero la horloĝon el la interna poŝo de la ulo, metis ĝin en pistujon kaj bat-erigis ĝin, kaj post diversaj iluziistaj trukoj li redonis ĝin sendamaĝan. Mi ne bezonas diri, ke la horloĝo funkciis perfekte.

– Tio estas konata, ion similan ankaŭ mi jam travivis, sed tio okazis antaŭ longe. Permesu al mi demandi ion! Antaŭ ĉ. du

semajnoj mi eksentis, ke ĉe Csabi kaj lia edzino okazis io eksterordinara. Ĉu vere? – demandas Ella.

– Jes, ĉu temas pri nia „komuna amiko”?

– Jes ja.

– La afero tiriĝis de unu kaj duonjaro – rakontas Elinjo –, sed antaŭ ĉ. du semajnoj estis konigita la tribunala decido, t.e. ili divorcis. Eble ankaŭ vi memoras, Ella, ke Rozinjo kaj Csabi fojon post fojoj adultis. Komence ili asertis, ke tio okazas laŭ interkonsento, do ke estas kompenso fari unu trompon venĝe al alia trompo. Fine ili jam ne povis matematike sekvi kaj kontigi ilin, tial do okazis rompo inter ili.

– Laŭ mi tia adulto tien-reen estas eksterordinare erara kaj misa starpunkto – konstatas Ella.

– Mi ne scias, kiu en kiu direkto foriris, kun kiu vivas momente, se ili entute sukcesis elekti tiun certan unu el la amaso, ĉar ili estas ja tre elektemaj.

– Nu jes. Csabi volis iniciati ankaŭ kun mi amrilaton, sed mi ne cedis – fanfaronas Ella.

– Ĉu vi pensas pri tio, kiam Csabi kondutis tiel skandale ĉe la familio Tobijo?

– Jes, sed ne nur tie, ankaŭ ĉe Lilinjo dum la silvestra amuzo, poste ĉe Prisko dum nomtago kaj plue en la teatro. Mi klopodis eviti Csaba laŭeble plej malproksime. Eĉ, intence mi tiom ofendis lin, ke poste ni ne plu intersalutis.

– Malgraŭ tio Csabi kaj Rozinjo ĉeestis la plej belan sepulton de la mondo.

– Ĉu vere? Kiam ĝi okazis?

– Nu ja, vi ne povis informiĝi. Tio estis via enterigo.

– Ho Dio, se mi estus ĝin vidinta! – aldonas Ella mortserioze.

Tiam ambaŭflanke de la fotelo eksonas enkonstruita kaŝmegafono. Ĝentila vira voĉo petas min, transiri bonvole en la kontraŭan ĉambron, kie du sinjorinoj interparolas.

La muro disduiĝas...

Mi pensas pri tio, kial mi bezonas transiri en la nun jam malplenan ĉambron.

Ĉu eble pro tio, ke ankaŭ mi ne vidis mian propran enterigon?

(2018)

## Rilaksado fariĝis por mi osto en la gorgo

Mi telefonos al mia amikino... Eble du semajnojn pli frue ni renkontiĝis en la kafejo de strato Animkastelo, kaj dume malkovris, ke niaj komunaj gekonatoj divorcis, sed ni ne sukcesis diveni la kialon. Kompreneble, ni babilis ankoraŭ pri multo alia.

“Nun mi ne estas hejme. Bonvolu lasi mesaĝon aŭ rakonti vian plendon. Vi havas maksimume dek minutojn.”

– Saluton, Valenjo! Terure mi bedaŭras, ke vi ne estas hejme. Almenaŭ dudek-foje mi vokis vin, sed nun mi ne plu povas reteni min. Nu, plendojn mi ne havas, sed, vi memoras, vi trejnigis min en rilaksado, vi instrukciis min, kiel fari, eĉ, vi donis al mi presitan priskribon. Nu, imagu, ĝi ne funkcias ĉe mi, ĉar la instrukciaro estas laŭ mi funde malbona. Jen ĉi tie mi legas: “Ĉio malbona foriĝas el mia korpo, animo kaj spirito, kiam mi elblovas la aeron. Ĉio, kion mi bezonas, aperas, renaskiĝas en mi en formo de energio, kiam mi enspiras la aeron. Kiam mi faras la spirekzercojn, mi pensas nur pri tio.” Tion mi opinias blufa sensencaĵo, ĉar se ĉio malbona foriras el mi, kiam mi elblovas la aeron, restas ja nenio: nek pulmoj, nek hepato, ne renoj. Ankaŭ mia sangopremo ĉesus, kaj mi povus forĵeti mian tensiometron, kvankam nur antaŭ unu semajno mi aĉetis ĝin sufiĉe multekoste. Kaj se mi enspiras la aeron, kio do renaskiĝas en mi? Nu, neniu aŭdacu aserti, ke mi ricevos miajn laktodontojn. Kial mi bezonus, ke mia miopeco renaskiĝu, kaj krome ke mi estu energiplena! Vi spertis, kara Valenjo, ke mi ĉion eldiras, kiel mi pensas. Mi neniam mensogas. Nu, kaj jen tia aserto: “Mi estas ekvilibra, akceptas min mem, ne koleras, malamas neniun, repaciĝas kun mi kaj aliaj.” Nu, ankaŭ ĉi tie ne ĉio kongruas. Kial ne koleri, se Kolomano, la najbaro ne purlavas la koridoron, kvankam venis lia vico? Neniu ja decidu anstataŭ mi, kiun mi koleru! Vi scias, kiom frapis min la morto de mia baptofilino, kaj vi scias ankaŭ, ke sole ŝiaj gepatroj kulpas prie. Ili puŝis ŝin en memmortigon. Nun kial ne malami ilin? Kvankam la leĝo ja ne

povis aranĝi ĉi tiun klaran situacion, tamen mi scias, ke ili estas respondecaj, ili faris la vivon al la eta Katenjo komplete netolerebla. Dum mi povos malfermi la buŝon, mi ne pardonos ilin. Kaj en tiu uzindikaro, kiun vi donis al mi, tamen tekstas jeno: “Kien ajn mi iras, la homoj ame akceptas min. Mi havas bonajn rilatojn al miaj kunhomoj.” Pardonu mian nekredemon, sed en kia rilato mi povus esti kun nekonataj homoj, ĉu vi komprenas? Ili, kiuj vidas min la unuan fojon, akceptus min ame? Nu, ne! Mi havas mil miliardojn da ekzemploj, ke oni ĉikanas min en oficejoj; se mi interesiĝas pri io en vendejoj, oni alĵetas nur du-tri grumblojn sed ne respondas kontentige, ajnulo impertinentas diri, ke li aŭ ŝi estas ankoraŭ komencanto, kaj ke la aĵo troviĝas ne en ĉi tiu sekcio. Se mi dirus al iu, kiu demandas min pri io, ke mu-mu-mu, mi esprimus per tio, en kia rilato mi ĝuste staras kun tiu nova homo, kiu volas trude penetri en mian individuan sferon? “Mi vivas en paco kaj interkompreniĝo kun ĉiuj. Pacience mi atentis aliulojn.” Nu, ne! Kial mi volu esti tolerema kun rabmurdisto, ŝtelisto, perfortulo aŭ kun fraŭdulo? Tio konsideriĝus komplikeco, ĉu ne? Tion scias, eĉ kiu ne studis juron. Kaj oni kondamnas ankaŭ min, kvankam mi havas nenion komunan kun la krimo, kiun tiu faris. Nu ne, mi ne eniros en tian straton, kiom ajn vi volus, kara Valenjo.

“Mi lasas foriri la pasintecon kaj pardonas ĉiujn. Mi povas ĝoji pri la sukcesoj de miaj kunhomoj.” Ne, kaj ne! La pasinteco estas jam okazinta, ĝi havas instruojn, rezultojn, postsekvojn. Kaj jen denove tiu “mi pardonas ĉiujn”! Ĉu mi lasu, ke oni piedbatu min, humiligu min? Ĉu mi kisu por tio la manon? Kaj mi notu tion kiel sukceson de miaj kunhomoj? Eĉ mi ĝoju pri tio? Valenjo mia, ĉu vi kredas tiuspecajn sangoboligajn kaj humiligajn aferojn? Mi scias, ke vi estas terure okupita, krome viaj infanoj tiras-ŝiras vin kiel pupon, tial vi ne povis atenti sufiĉe. Mi komprenas vian situacion kaj ĝojas ne havi infanojn, sed pro amo al Dio, lasu, ke mi libere decidu, kies sukcesoj min plenigas per kontento.

“Mi deziras sanfavorajn manĝaĵojn. Mi admiras mian korpon, konservas ĝian sanon.” Kial oni devas emfazi tion? Ĉu vi scipovus montri al mi homon, kiu diras: ho, kiel bone estas, se mia korpo putras, mi ĝojas pri tio kaj mi konservas la putron por ĉiam? Nu, eksciu, ĉi tiu rilaksado fariĝis por mi osto en la gorgo. Sed mi elsputis ĝin, ĉu vi komprenas, kaj poste mi selektis, kio perfekte konvenas al mi.

“Mi fidas min kaj miajn antaŭsentojn. Mi fidas min, mian scion kaj miajn agojn. Estas ĝuste ĉiufoje, kion mi faras purakore. Mi estas valora kaj unika homo. Mi alte taksas kaj amas min.” Nu, tio estas centprocente vera. Tio estis ĉiam tiel, kaj ankaŭ poste mi ne ŝanĝos tion. Mi tute liberiĝis de miaj angoroj. Kaj tio estas bona kaj tre konvenas al mi.

\* \* \*

“Nun mi ne estas hejme. Bonvolu lasi mesaĝon aŭ rakonti vian plendon. Vi havas maksimume dek minutojn.”

– Pli frue mi ne scipovis ĉion rakonti. Laŭ mi ĉi tiu priskribo de rilaksado donas plurajn konsilojn, kiujn ĝuste vi bezonus. Valenjo! Jam plurfoje vi menciis rilate al mi, ke mi estas pesimista, melankolia, eĉ malica. Kompreneble, mi ne konsentas, sed nun mi proponas, ke ĝuste vi akceptu la rilaksadajn konsilojn, ĉar fakte vi bezonas ilin. Ekzemple ankaŭ pro tio, ke se vi ŝanĝiĝus, pli bone vi tolerus min, akceptus mian amon kaj zorgemon. Vi restus sobra en ĉiu situacio kaj ne farus ofendajn rimarkojn. Vi fariĝus ekvilibra kaj pli facile eltenus la eventualajn ŝokojn de la vivo. Vi ne envidus min, ĉar laŭ mi ankaŭ vi scipovus kuiri same bongustan bovosupon kiel mi. Do por adiaŭi, permesu ankoraŭ diri, ke formu pli bonajn kaj akcepteblajn rilatojn. Tiam vi povos veni en ajnan situacion, vi restos trankvila kaj sobra, ĝuste tiel kiel mi... Mi igas saluti la infanojn. Kison, kison...

(2017)

## Ĉe Danubo

La feste vestita studento antaŭdecidis, eltiri per sia maldekstra mano la lastan slipon maldekstre. Nun li tamen iom konfuziĝis, ĉar ne unu, sed du lastaj tezoj kuŝis sur la tablo. Nur eteta anguleto de la pli lasta elvideblis, ĉar la lasta tiom gluiĝis al ĝi kiel subdisketo al ŝraŭbino. Ĉu ekpuŝeti, fortiri ĝin, ĉu humidigi la fingrojn aŭ devii de sia kutima, sortodecida metodo? Kiel reagos la docento, se li komencos selekti aŭ tien-reen ŝovi la tezojn? Kapdolorigaj demandoj. Li fermis la okulojn kaj levis unu el la tezoj. Sen rigardi, li tuj transdonis ĝin al la ekzamenanto.

– Kara Eŭgeno! – diris docento Aŭgusto Lelik. – Mi tre ĝojas povi revidi vin. Vi eltiris la analizon de la poemo *Ĉe Danubo* de Attila József, kaj mi volus provizi vin per kelkaj bonaj konsiloj. Nun vi ne povos trafi en kavon, ja vi ne pelos pavon. Bonvolu bridi vian temperamenton! Estu prudenta, ja ofte okazas, ke ideoj trafas malfortan menson, kaj el tio rezultas granda perturbo. Plenigu vian animon beato, paco kaj feliĉo!

Eŭgeno konfuziĝis, ĉar li sentis, ke li ĉion forgesis. Kion nun fari, kiam lia instruisto atendas de li plej bonan plenumon. Tia fido paralize efikis sur lin. Li faris kelkajn gorgoskrapojn, poste malrapide komencis:

– Je-ees, mi tre ŝatas Attila József, ĉar... nu, nun tiel subite mi malfacile scipovus diri, kial... Sed eble mi ŝatas Attila József pro tio, ke... kiel diri..., lia plej bona poemo estas *Ĉe Danubo*. Ankaŭ pasintfoje, kiam mi renkontis lin ĉe Danubo, li sidis ĝuste sur la plej suba ŝtono de la bordo kaj rigardis, kiel melonŝeloj naĝas suden, kiujn la reprezentantoj de la reganta klaso estis ĵetintaj sur la dorson de la akvoamaso, simbolanta la forton de la malpuraj, ŝmirmakulitaj laboristoj... Danubo nur fluis plu, kaj la ondoj alridadis lin. Danubo elpluis, hm, elfluis el lia koro... Ho jes, kaj ekgutis pluv', sed Danubo ne haltis, ĝi fluis same plu kaj plu. Attila József diris ankaŭ, ke lia patrino estis kumana, la patro duo-



ne sikula<sup>1</sup>, duone rumana aŭ eble tute tia. La patrino lulis lin, rakontis al li, dum ŝi lavis ĉiujn malpurajn vestojn de la urbo. Dume ŝi diris ankaŭ jenon, kion nun mi laŭvorte citas: “Vidu, se ni ne plu estos!...” Mi opinias, ke oni komprenu tiel, ke liaj gepatroj reprezentas la paseon, kaj al la poeto doniĝis herede la nuntempo. Tiel okazas jam de cent mil jaroj. Lia patrino kuiris ĉiam ion dolĉan, kaj la patro ĉiufoje diris ion veran, laŭ la poemo: “El panja buŝo dolĉis la manĝbulo, el patra buŝ’ la ver’ estis radia.” La poeto estis senlaborulo. Nu, ne tiel li esprimis sin sed jene: “mi volas labori”. Danubo estis por li la paseo, nuntempo kaj futuro. Ankaŭ nun en ĉiu minuto enestas la paseo kaj futuro, tamen ĝuste la nuntempon oni forŝtelis el ĝi...

S-ro instruisto! Mi bedaŭras, ke miaj pensoj konfuziĝis, sekvafoje mi dungos gardiston por ili. Espereble li ne forvagos ien simile. Sekve... Mi demandis lin, kion li volus. Li diris, ke mi ne plu volas batali; se la softaj ondoj de Danubo brakumas unu la aliajn, tiam ankaŭ ni interbrakumu. Tio estas nia tasko. Nu, tiel do ne plu estos senlaboruloj.

La docento ĵetis al li tre suspektindan rigardon kaj faltigis la frunton.

– Pasintfoje ekzameniĝis ĉe mi hipopotamo. Ĉu vi konas lin? Ĉu ne? Nu, ne gravas, sekvafoje vi trafos vin ambaŭ en la zooparko. Mi donis al li la temon rilato inter algoj kaj beletro. Li parolis, silentis, silentis kaj parolis. Cetere lin trafis nenio damaĝa, mi elĵetis lin. Li flugis kiel filandro en la aero. Kial vi algapas miajn okulojn tiom penetre? Vi scivolas, ĉu ne, kiel mi? Kiom da konoj mi sukcesus vringi el vi per torturado? Cetere, Eŭgeno, vi estas cinika studento, ja flarante florodoron, vi ĉirkaŭrigardas, serĉante ĉerkon. Kaj bedaŭrinde vi estas idealisto, ĉar vi scias, ke rozo estas pli bonodora ol savoja brasiko, tial do vi volas kuiri el ĝi pli

---

<sup>1</sup> Sikuloj estas hungara minoritato en Rumanio.

bongustan supon. Ĉu vi povas pruvi per du atestantoj, ke tiel statas la afero? Nu jes, per falsaj atestantoj...

– Pardonu, s-ro profesoro! Tion morgaŭ mi ankoraŭ sciis...

– Nu jes, nu jes! Vi volas fuĝi antaŭ la ekzameno en komaton. Ĉu sen pasporto kaj vizo? Ne algapu min kiel monto Gerharo la riveron! Ni ne estas ĉe Danubo! Ĉu ne indiferentas, ĉu vi havas naŭzon aŭ kaŭzon? Vi havas al Danubo kaŭzon por naŭzo. Vi kunportis nur la ujon de via cerbo. Mi eldiros, ja nun eldiras: vi mensogas. Mensogo estas, kion vi kredas, sed ne volas kredi kaj disvastigas ĝin kiel veron. Nu, ne gravas, mi donas rondan nulon por ĉi tiu ekzameno, sed promesu, ke ankaŭ duonjaron post via morto vi ridetos kiel optimisto...

(2002)

## Abolo de malsanoj

Kun aparta respekto mi salutas ĉiujn konatajn kaj nekonatajn kolegojn esploristojn en ĉi tiu sunbrila, bonhumora simpozio, kiun la organiza komitato kunvokis, por pritrakti la vojmontran tendencon, tre gravan en la sanservoj: la ŝpareman malsanulmastrumadon.

El ĉi tiu multfaceta, ĉiurilate futur-alstreba scienca esplorserio mi elektis la memneniigajn malsanojn. Pro la graveco de la temo mi volus anticipe konstati, ke la *terminus technicus*<sup>2</sup> memneniigaj malsanoj estas eksterordinare primitiva, malprava kaj senbaza esprimo. Ĉi tiu nescienca termino disvastiĝis bedaŭrinde pro tio, ke en medicinaj rondoj komencis mastri kaj mastrumi individuoj, kiuj ja estas unktitaj kiel fakuloj, sed kiujn la naturo forgesis doti eĉ per plej minimumaj ortografiaj konoj. Estas nome ne indiferece, ĉu vi mem neniigas aŭ vi mem neniigas vin. Laŭ la unua duono de ĉi lasta aserto la malsanoj neniigas sin mem (kp. memneniigaj malsanoj). Se la afero status tiel, kaj se ĝi status tiel, ni jam povas foradiaŭi rimorsojn, tagblindecon aŭ vomemon. Kvankam ĉi tiuj malsanoj povus vin pli aŭ malpli frue ja neniigi. Do ne vi mem neniigas ilin, sed, mi emfazas, la malsanoj neniigas vin mem. Se ni akceptas tion kiel aksiomon, el ĝi sekvas alia aksiomo. Nome: la malsanoj neniigas sin mem. Kaj tio estas sensacia malkovro! Tiel enorme grava rezulto, kiu kompareblas nur kun la surluniĝo aŭ tranaza apendicektomio.

Sed ni reiru al la same tre grava temo, ĉu la sin mem neniigaj malsanoj aŭ la vin mem neniigaj malsanoj aperis dum la lasta tempo. Estas, kompreneble, ne indiferece, ĉar ili signifas siaparte ion tute diferencon. Se vi bone atentis, pli frue mi reliefe kaj detale eksplikis ĉi tiun malsamecon, kaj el ĝi rezultas, ke nun jam ankaŭ

---

<sup>2</sup> fakesprimo – latine

laŭ vi la diferenco estas klara. Almenaŭ tiom, kiom la valoro de  $x$  aŭ  $y$  en ekvacio.

El tio, kion mi diris, sekvas ankaŭ, ke se la malsanoj estas memneniigaj, ni devas tute malkonstrui la reton de sanservoj, ĉar ilia neceso fariĝos egala al nulo. Por simple klarigi, tio estas kvazaŭ ni subtrahas el minus du plus du, do la rezulto egalas nulon.

Se estos tiel, ni jam povas anticipi esperon kaj diri, ke jes, estas tiel, ĉar pluraj indikoj de tio jam fakte percepteblas, ripetiĝas, esperigas nin kaj stimulas al atingo de pluaj rezultoj. *Do jam temp' está* decidigi nin malkonstrui nian mondfaman medicinan sciencan.

Sur la projekciita diagramo videblas plastika ekzemplo, kiun mi nun volus pli funde klarigi. La verda kolono ilustras la oftecon de la viraj malsanoj, dum la blua kolono rilatas al virinoj. Ĉi lasta estas multe pli alta, ĉar statistikoj pruvas, ke virinoj havas pli da organoj, pli riĉan, pli komplikan psikon kaj kutime pli longajn ungojn. Mi ne volas roli kiel politikisto – Dio gardu min! –, sed longe-larĝe, dome kaj eksterdome oni ade-ree aŭdas, ke ĉiuj homoj estas egalrangaj, pro nasko ili ne ĝuu privilegiojn, estu ĉiuj tute egalaj. Nu, se ni rigardas la duan diagramon – mi petas la bildon, dankon –, ni vidas, ke la alto de la verda kaj blua diagramoj estas egala, do la proporcio, disvastiĝo de la viraj kaj virinaj malsanoj identas, t.e. egalas.

Sed tion oni povas, eĉ bezonas fajnigi. Ni volas transpreni la esplorajn, prisanajn kaj praktikajn vidpunktojn de landoj kun pli evoluinta sanitaro, ĉar ili estas avantaĝaj por ni. En kelkaj landoj de Afriko ekzemple oni traktas malsanulojn kun tensioproblemoj tiel, ke alttensiuloj donas sangon al bastensiuloj. En ilia kazo oni do jam ekskludis ĉi tiun malsanon, ne plu necesas do tensiometroj, asistantinoj, Ruĝa Kruco kaj sangoplasmo. Samtempe per prezidenta dekreto oni abolis la arterio-sklerozon, do la kalkiĝon

de la arterioj, ĉar plej evidente pruveblas, ke estingita kalko ne povas penetri en la sangocirkuladon, do arteriosklerozo efektive ne ekzistas. Kompreneble, ankaŭ enlandaj esploristoj okupiĝis pri similaj sciencaj eksperimentoj. Certe ankaŭ vi informiĝis, ke d-ro prof. Streĉokul ne plu operacias katarakton en la Deĵora Blindulflega Instituto. Per scienca eksperimento li nome pruvis, ke tio ne plu necesas. La profesoro metis kvincent-eŭran bankbileton sur la tablon antaŭ sia paciento kaj alvokis lin: “Nu, estimata, se vi vidas, vi povas havi ĝin!” Kaj la ulo prenis ĝin, t.e. li estis simulanto. Depost tiam ĉe la onidiraj malsanuloj ĉesis miopeco kaj malmiopeco, ĉar tie kaj ĉie ili serĉadas streĉokule kvincent-eŭrajn bankbiletojn, dume akriĝas siajn irisojn kaj okulharojn. Ĉar dum longaj jarcentoj ne ekzistis en la kuracaj sciencoj medicino de eksteraj malsanoj, sur logika bazo povas ekzisti ja nek ties kontraŭo, tial oni ĉesigis la medicinon de internaj malsanoj. Ĝi ne estas bezonata, ĉar origine la intern-medicinaj morboj venas de ekstere aŭ pli ĝuste ili venas, sed se tiaj ne ekzistas, oni ne bezonas ankaŭ interne sanigi ilin. Kial oni bezonus financi dermatologion, se ĉiu individuo spertas sur la propra haŭto, ke ankaŭ sekse li ne malsanas. Infano estas propre etkreska adolto, do homo, da kiaj tre multaj vivas en la lando. Se nun ni instalus por Junjo aŭ Toĉjo kaj ĉiuj aliaj apartan kuracejon, ĉiuj monuoj baldaŭ platiĝus, kaj ĉesus la espero replenigi ilin. Se urinado, do urologio havis apartan sekcion, tiam laŭ la logiko povus havi similajn klinikojn ankaŭ glutado, spirado, doloroj kaj varikoj. Estas ja evidente, ke ili malnecesas, ja glutado aŭ misglutado estas tiel same ne malsanoj kiel rapidfervojo, genuosto kaj enspirado.

Esplorteamo de kuracistoj asertas, ke konsumantoj de kapsikoj estas tre facilkredaj. Ili prenas serioze ĉiajn novaĵojn, klaĉojn kaj ŝercojn. Eĉ tion, se iu asertas, ke kapsiko estas la plej venena vegetaĵo de la mondo.

Esploroj pruvas, ke 99,99 procentoj de la mortintoj pro kancero plurfoje konsumis kapsikon.

Laŭ kelkaj sciencistoj ankaŭ pano, akvo kaj lakto kaŭzas similajn anim-ŝrumpojn, sed ĉi-kampe ankoraŭ bezonatas pluaj malkovroj. En sia antaŭ nelonge publikigita libro la furaĝkuracisto Kamilo Luserna asertas interalie, ke ankaŭ li partoprenis la eksperimenton, kaj ankoraŭ ne scias, tamen pruvas proprakorpe kaj -anime kaj per la propra stomako, ke li mortos, ĉar jam ankaŭ li konsumis panon, akvon kaj lakton. Kontraŭe, kelkaj falsaj esploristoj, pseŭdosciencistoj, kiuj kredigas sin senmortaj, manĝas panon (germane *das Brot*, ruse *хлеб*, angle *bread*, hungare *kenyér* ktp) po kilogramoj. Ankaŭ el la listigo videblas, pri kiel grava internacia esploro temas.

Nepras al mi paroli ankoraŭ pri tio, ke ekde morgaŭ sukermalsanuloj ne povos dormi tiel dolĉe kiel katidoj, ĉar tio neeviteble gravigos ilian malsanon. Nek tie, nek aliloke konsilindas diri pri individuoj, ke li aŭ ŝi estas dolĉe kara, ĉar per tio ni povus malutili al la sukermalsanuloj. Plue, la problemaro de la sana spirado kaj ftizo estas transmetita en la taskosferon de danclernejoj. Ĉe stomakalgio helpas kreno, minerala akvo kaj la plimultigo de feliĉhormonoj per laŭdoj kaj karesoj. Por kapdoloro estas preskribita kompreso, freŝa aero, sanfavora prilumado. Kontraŭ konstipo oni gargaru per kamomila teo. Ĉe lakso oni bezonas rapide elbusiĝi. Se doloras vin la piedoj, ripozigu ilin hejme. Ĉe netolerebla dentodoloro konsilindas eltiri ĝin per pinĉilo. En miaj ekzemploj kaj la efektividaj disponoj klare videblas la strebo, ke hodiaŭ kaj morgaŭ, finfine kaj definitive ni estas abolintaj kaj abolantaj la malsanojn.

Kun respekto mi dankas la ĉeestantojn por la konsento. Por sekureco mi tamen demandas: ĉu troviĝas inter vi iu, kiun doloras la kapo, dento, dorso, kiu suferas pro stomakalgio aŭ ne vidas klare la aferojn?

Tutkore mi ĝojas, ke neniuj kuraĝis anonci sin.

(2019)

Kvin rakontoj de **Attila Salga** sur la hempaĝo de [Hungaria Esperanto-Asocio](#).  
Ĉiuj rajtoj ĉe la aŭtoro.

